

Recenzo_Samodaj

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8447>

Esperantista arabesko

La libro ‚Esperanto kaj vivo’ de la rusa esperantisto Vladimir Samodaj, kiun la moskva eldonejo Impeto prezentis en 2010 al la publiko, estas grandparte la ripeto de la verko, kiu aperis jam en 1999 de la sama aŭtoro kaj en la sama eldonejo kun la titolo ‚Ne nur legendoj, ne nur pri SEJM’. La nova eldono riĉiĝis per la aldono de novaj ĉapitroj, kiujn la interesita leganto renkontos kun scivolemo kaj ravo. Principe, la vivo de Samodaj estis ligita kun almenaŭ tri kernaj temoj: malfacila persona ekzisto, araba mondo kaj Esperanto. Ĉar temas pri unika temokombinaĵo kaj sufiĉe atentokapta biografio, la travivaĵoj de la 75-jara ekssovetiano estas memorindaj kaj adekvate rakontindaj.

Samodaj naskiĝis en 1935 en Odeso, lia patro pereis 27-jara en 1940, lia patrino ne povis vivteni du filojn, do Samodaj estis sendita al iu vilaĝo ĉe la lago Ladoga, proksima de la limo kun Finnlando, kie vivis lia onklino, kiu ne havis infanojn. En 1941, kiam la germana armeo invadis kaj okupis Sovetunion, Samodaj kaj ties avino estis evakuitaj al pli profunda Rusio. Ilia trajno estis bombatakita, feliĉe Samodaj kaj la avino pluvivis. Almozpetante ili vagadis tra la vastega lando ĝis kiam ili alvenis en la urbo Vjatka, poste Samodaj retrovis sin ĉe la onklino, kiu laboris en iu apudvolga vilaĝo inter Stalingrado kaj Astraĥano. Homoj mortis pro malsato, oni devis esti rabisto por akiri manĝaĵojn, ankaŭ Samodaj, kiu ŝtelis karotojn. En tiu vilaĝo, la sepjara knabo ekvizitis la lernejon. Post la liberigo (aŭ okupo) de Odeso far la soveta armeo en aprilo 1944 Samodaj revenis ĉi-havenurben, kie li revidis la patrinon. Denove la patrino ne kapablis vivteni la filojn, do Samodaj estis transdonita al iu internejo de orfoj kaj duonorfoj. Kurioze estas, ke en tiu internejo Samodaj lernis la anglan lingvon. Post tiu evidente iom sovaĝa edukejo Samodaj vizitis ordinaran ukrainan lernejon, kie oni instruis la francan lingvon. Hejme la familio vivis sen kurenta akvo kaj sen elektro. Samodaj estis malbona lernanto, kaj li deziris fariĝi maristo, sed ne sukcesis. Sed li havis kelkajn fortojn kaj talentojn; sporto, pafado kaj desegno – en ĉi tiuj fakoj li eĉ atingis majstrajn rezultojn. Post kvarjara studado (1950-54) Samodaj akiris la diplomon kiel teknikisto-mekanikisto-konstruisto pri levaj kaj fosaj maŝinoj. Sian unuan laborlokon Samodaj ricevis en la nafta industrio de Azerbajĝano. Post la arma deĵorado sekvis 30-monata infera laboro kiel ŝiphejtisto en Odeso, ĉar alia posteno ne troviĝis. Venis iom pli bonaj tempoj. En aprilo 1958 Samodaj malkovris anoncon pri Esperanto-kurso, al kiu li aliĝis. Tie li konatiĝis kun la veterano Aleksej Verŝinin kaj kun Anatolo Gonĉarov, kiu same trovis la vojon al Esperanto. Ĉe Verŝinin Samodaj karieris kiel ‚sciencia sekretario’. Kiam Samodaj promenadis en Moskvo, li ekvidis anoncon pri la Moskva Ŝtata Universitato kaj ties Instituto pri orientaj lingvoj. Samodaj enskribiĝis, trapasis la ekzamenojn kaj estis akceptita kiel studento por la fako araba. En Moskvo li partoprenis ankaŭ la Esperanto-agadon, konatiĝis kun la tiamaj korifeoj kaj ne maltrafis, en 1963, la bonŝancon veturi kun la soveta delegacio al la 48a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio, Bulgario. Tie li aŭdis paroladi Gaston Waringhien, kiun li malbone komprenis pro lia franca prononco. Ĉi tiu epizodo finas la unuan parton de la libro. Post

la kongreso Samodaj estis sendita kiel arablingva tradukisto al Alĝerio, sed tie oni uzadis la francan. Tial li pluvojaĝis al Norda Jemeno, kie oni vere parolis nur arabe. Liaj verkiste talentitaj raportoj pri vojaĝoj kaj restadoj en la arabaj landoj, ankaŭ Irako, Sirio kaj Jordanio, nun sekvas ĝustatempe kiam la araba mondo bolas. Al la publiko Samodaj iĝis konata kiel kunlaboranto de la arablingva redakcio de ‚Moskvaj Novaĵoj’, al la esperantistoj kiel aktivulo en SEJM, SSOD, ASE, MEM kaj UEA. Konsiderinda por la Esperanto-historiografio estas la tuta granda parto pri la komplika evoluo de la Esperanto-movado en Sovetunio, kiu konsistas el multegaj kuriozaĵoj, kiujn oni prefere legu rekte en lia libro mem. Malgraŭ malagrablaj epizodoj temas do pri ĝuinda memuaro originale verkita, en kiu ne forestas la delikata humuro, ĉar multaj spertoj en la vivo de Samodaj estis iom strangaj. Ĉefaj mankoj de la eldonaĵo estas la forgesita indekso de enhavo, la ne tro bonkvalitaj fotoj kaj la iom kruda bindo.

Andreas Künzli

Recenzo_Gončarov

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8521>

Esperanto inter finvenkismo kaj raŭmismo

La celo de la intelekta ekzerco de la rusa esperantisto Anatolo Gončarov estas kolekti iujn citaĵojn de konataj opiniantoj de la Esperanto-movado „pri la problemoj de Esperanto“ kaj raŭmisme komenti ilin. La citaĵoj estas ĉerpitaj precipe el kvazaŭ-oficialaj periodaĵoj kiel Literatura Foiro, Esperanto (UEA), La Gazeto, El Popola Ĉinio, Fonto, La Ondo de Esperanto, Heroldo de Esperanto, en kiuj aperis diverstendencaj artikoloj pri motivacio kaj identeco de esperantisto kaj karaktero de la Esperanto-movado.

La prezenton de citaĵoj uverturas la svisa eksinterlingvisto Tazio Carlevaro, kiu diagnozis el la vidpunkto de profesia psikiatro, eble ne sen humuro, sed verŝajne ankaŭ tute serioze, ke en la kazo de la esperantistoj temas pri speco de frenezuloj, psikopatoj kaj ksenoglotuloj; kiel konsolon li aldonis, ke esperantistoj ne estas la solaj tiaj, sed psikologie kompareblaj kun lingvistoj, poetoj, aŭtoroj de teatro, ktp. Sekvas eldiro de Trevor Steele, kiu ĝojas, ke li havas la privilegion troviĝi inter esperantistoj, kiujn li konsideras la elito de la homaro, dum Giorgio Silfer konsideras Esperanton eĉ kiel solvon de la lingva problemo. Claude Piron opiniis, ke Esperanto estas bona lingvo, ĉar ĝi solvas komunikproblemojn en psike pli sana maniero ol la angla tion faras. Daniele Vitali aliĝis al la Esperanto-movado, ĉar li komprenis, ke li eniris plaĉe utopian mondon. Por Eli Urbanová esperantistoj estas kvazaŭ unu familio, por Edgar de Zilah eĉ io pli alta. Por Nikolin la malkovro de Esperanto respondis al iu persona bezono. Giuseppe Vallente eĉ sentas sin proprahejme en Esperantio, ĉar tiu hejmo peras varmecon, kiel konfirmis en tiu vico alia esperantisto. Iu ĉina samideano skribis, ke Esperanto estas komunikilo por kultura interŝanĝo. Jen la esenco de la unuaj 11 citaĵoj. Sekvas aro da similtipaj pledoj, kiuj probable taŭgas por *La Kancerkliniko*, sed ne ĉiam por la serioza Esperanto-propagando. La troigitaj konsideroj pri Esperanto kulminiĝas preskaŭ patologie en la konfeso de Gončarov, ke li „sufervis“ je la malsano nomita „esperantozo“, ĉar tiom fanatike li okupiĝis pri ĝi. Por Baghy (1966) esti esperantisto signifis kvazaŭ denaskan destinon. Tomasz Chmielik interpretas la esperantismon kiel diasporan fenomenon kaj komparas ĝin kun la sorto de la judaro, kiu longe vivis en diasporo. Laŭ Carlo Minnaja Esperanton savis la „interna ideo“. Dank’ al Esperanto Walter Ŝelazny en la 70aj jaroj trovis kelkajn amikojn. Laŭ Ulrich Lins (1986) la granda plimulto de la esperantistoj ĉiam opiniis, ke Esperanto simbolas la naturan sopiron de la homaro al paco. Ktp.

Ĉiuj-ĉi iom ridindaj frazaĵoj kontrastas kun jena demando: Kial la mondo ĝin ne adoptis, se ĝi estas supera afero (de Zilah), unika fenomeno (MacGill), feliĉigilo (Hans Bakker), vivmaniero (Enderby), kultura identigilo (Silfer), ne nur lingvo sed komunumo kun difinita karaktero (Rátkai), vivanta lingvo de vivanta popolo (Duc Goninaz), finfine unika ekzemplo de praktika realigo de la eŭropa civitismo kaj socikultura avangardo (Silfer), eĉ nacio (Karolo Piĉ). Pro kio do Esperantujo ne evoluas (Ŝelazny) kaj kial esperantistoj vivas ne nur izolite, sed socilime, do rande de la socio (Silfer) kiel efemera kuriozaĵo (dirus la recenzanto) ?

Krom la litanio de fanfaronoj kaj fantazioj, kiuj havas sendube religiecajn, ja sektemajn trajtojn, reprezentigas inter la citaĵoj ankaŭ kelkaj pli raciaj voĉoj, precipe en la dua parto (mankas sistemigo laŭ temoj kaj eble ankaŭ laŭ jaro de la farita eldiro). Ekzemple Willem Verloren van Themaat kredis, ke la diasporeco de Esperanto ne plu sufiĉas, se Esperanto volas solvi la mondan lingvan problemon. En Litovio Valdas Banaitis observis, ke novaj Esperanto-kursoj nutras nur amatoran movadon, subtenas ĝian vegetadon, sed ne antaŭenigas Esperanton en ĝia internacia, interlingva kaj propedeŭtika roloj. Trevor Steele plendas pri tro da komencantoj, dum la meza nivelo mankas kaj Valentin Melnikov spertis, ke post la fino de la elementaj kursoj nur tre malmultaj personoj restas aktivaj en la Esperanto-medio. Ĉe preskaŭ ĉiuj esperantistoj, kiujn Claude Gacond renkontis, konstatablis preskaŭ absoluta sci-vakuo pri la Esperanto-kulturo. Plej radikale sin anoncis Georgo Kamaĉo, kiu konfesis (2002): „Mi emas kabei ... Perdiĝis la emo iri al kongresoj, kie post kvinjara partopreno oni renkontas konstante la samajn vizaĝojn, la samajn gurditajn temojn.“ Pro tio li simple „fajfas pri la sorto de niaj institucioj aŭ pri la estontado de nia lingvo.“ Gonĉarov lasas ĉi tiun citaĵon sen komento. Ankaŭ Gonçalo Neves forlasis la Esperanto-movadon, sed restos interesata pri planlingvismo. Alian ekstremon de esperantisteco reprezentas Renato Corsetti, kiu kiel konvinkita praelano, laŭ propra klarigo, estas relative indiferenta je la komunumo de Esperanto-parolantoj kaj de la kulturaj kaj literaturaj valoroj kaj anstataŭ tio ĉefe celas disvastigi Esperanton kiel rimedon por interkompreniĝo inter neesperantistoj. Miroslav Malovec eĉ vidas en la finvenkismo la plej grandan obstaklon al la disvolviĝo de Esperanto, ĉar ĝi implicas koncepton de altrudo. Laŭ Kalle Kniivilä la mondo vere aŭskultos nin nur se ni havos ion valoran por diri. Pola Studenta Esperanto-Komitato postulis jam en 1983, ke la esperantistoj devas starigadi antaŭ si celojn realigeblajn en la daŭro de 10-15 jaroj kaj altigi la kvaliton de la Esperanto-kulturo. Bertil Englund preferas limigitan nombron de bone parolantaj individuoj ol amase balbutantaj eternaj komencantoj, kaj Nikolao Gudskov entute kredas (1994), ke la fina venko ne eblas. Fine Esperanto estas ne pli ol minoritata lingvo (de Seabra) kaj ĉio mankas al ni por formi nacion (de Zilah).

Kiel adepto de la Esperanta Civito, kiu laŭ Jouko Lindstedt ne estas serioza afero, Gonĉarov ŝajnas apogi plimulte la fremdajn opiniojn kaj asertojn de li elektitajn, kiuj evidente formas la tutecon de lia persona mondkoncepto raŭmisma. Eĉ la kritikajn esprimojn li bonvenigas, ĉar ŝajnas, ke li subkomprenas ilin kiel admonon por plibonigi la situacion de Esperanto, kiun li mem konsideris senespera antaŭ ol li mem resurektis kiel esperantisto kadre de la Esperanta Civito. Povas esti, ke multaj esperantistoj vidas la aferojn same aŭ simile kaj konsentus pri multaj eldiroj en la 80 citaĵoj.

Per la prilaboraĵo de Gonĉarov la finvenkismo ricevis raŭmisman vizaĝon kaj la raŭmisma propagando novan pravigon. Ruza truko, kiun la ĉaŭdefonaj civitistoj certe aplaudos. Sed ĉu kun pura konscienco ? En la kazo de la gonĉarova ekzerco temas pri nenio alia ol la evidenta provo transformi finvenkistojn al raŭmistoj kaj uzurpi la tradiciajn finvenkismajn argumentojn por vendi ilin kiel raŭmismajn ideojn. Per ĉi tiu ekzerco la antagonismo inter finvenkismo kaj raŭmismo ne nur atingis novan kulminon, sed estas ankaŭ definitive kondukita kvazaŭ al absurdo.

Andreas Künzli

